


Esperanto 277

aktuell



42. Jahr (2023) №1 (277)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



△ La 7-a Luminesk' en Heilbronn. Esperanto-adeptoj sen moderna leksikono? Spertoj kun ChatGPT. Zamenhofa festo en Aŭstrio! Stadtführer für Berlin-Neukölln in Deutsch und Esperanto erschienen. Brückenschlag zu einer ethischen Lebensweise. Novajoj el Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Helpo por ukrainoj per Esperanto. Novjara renkontiĝo (NR) 2022/3. Englisch und Esperanto: Kulturelle Vorherrschaft oder mehr Gleichberechtigung? E-Books in Zahlen. Esperantista Migrado Aŭtuna. Der neue Vorstand der DEJ stellt sich vor! Protokoll zur Mitgliederversammlung 2022 der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) e. V. Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotizoj kaj donacoj)
/ **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge
und Spenden): HELADEFIERB,
Sparkasse Odenwaldkreis,
DE 3250 8519 5200 4011 4571.
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den
D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: **Elke Mondorf**
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413
gea.oficejo@esperanto.de

Membropripizorgado / Mitgliederbetreuung
DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine
andere Anschrift angegeben, an die
Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch
weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-
Durchwahlnummern** sind nach der
Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / **retmesaĝo al** gea.fe@esperanto.de
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell
erreichbar per E-Post-Adresse in der Form
vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111
gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg, Durchwahl -5125

Suborganizoj / Unterorganisationen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj / Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211
michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/ **Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de
**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter
für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,**
gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj / Rundreisen,
Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo / Informationsmaterial
Goar Engeländer, Durchwahl: -5127
goar.engelaender@esperanto.de

Medieneco

Hermann Kropfenberg, Durchwahl: -5121
medieneco@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,
Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de,
www.esperanto.de/buchversand
Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117
thomas.bormann@esperanto.de

**Vertreter des DEB in der EEU-
Versammlung/Reprezentanto de GEA en la
assembleo de EEU:** Jean-Paul Kuhfahl
Durchwahl: -5116

jean-paul.kuhfahl@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**
(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj
kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,
die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)
1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),
ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für
Romanische Sprachwissenschaft,
Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),
-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,
www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432
Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
bibliothek@esperanto-aalen.de
bibliothek-aalen@esperanto.de
www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de
(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,
030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart
eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /
Österreichischer Esperanto-Verband**
aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Viena / Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,
+43/1/53410-731, Postanschrift:
Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz
1, Postfach 25, 1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at,
www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes- beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen
siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst
Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg, Poŝtel.
+43/66473611289,
aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,
42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kropfenberg (Medieneco),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio
Esperanto aktuel kun -kune- havas ses
numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo
(vidu maldekstre supre) por 19 €
(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint
sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der
Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €
(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche
Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc
a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2023/2 ĝis
la 15-a de Marto 2023. Paperaj kontribuoj nur
esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu
supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte
(im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,
für Nr. 2023/2 bis zum 15. März 2023.
Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann
an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

pasis malfacila jaro, kaj estas multaj kaŭzoj esperi, ke 2023 fariĝos pli bona. La milito en Ukrainio kaj ĝiaj sekvoj trafas ankaŭ la Esperanto-movadon, eĉ se ni klopodas daŭrigi normalan laboron. Paco je akcepteblaj kondiĉoj hodiaŭ aspektas malproksima, se entute imagebla. Nian solidarecon bezonas unuavice la viktimoj de la agreso kontraŭ Ukrainio, sed ni ne forgesu ankaŭ la esperantistojn en Rusio – internacie pli kaj pli izolita lando. Kun kelkaj el ili mi kontaktas. Ankaŭ ili klopodas iamaniere daŭrigi, eĉ se vojaĝoj al okcidento fariĝis preskaŭ neeblaj. Kaj inverse: por mi mem ekzemple estas nekutime ne plu viziti landon, en kiu mi ja vivis dum ok jaroj. Komparoj kun la malvarma milito estas iom misgvidaj: unuflanke hodiaŭ ekzistas multe pli densa reto de interhomaj kontaktoj, feliĉe almenaŭ tio. Sed aliflanke mankas la konvinko – valida almenaŭ en la finaj jaroj de la tiama kontraŭstaro – ke la evoluo iras en la ĝustan direkton.

Ĉu ankaŭ io kuraĝiga? Jes: post la provizora fino de la pandemio la Esperanto-vivo ĉe ni denove normaligas. Jarfine en Germanio kiel en antaŭaj jaroj denove okazis tri ĉeestaj eventoj kun entute ĉirkaŭ 350 partoprenantoj: Luminesk' en Heilbronn, la Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden kaj JES apud Oranienburg. Homoj denove rezervas tiujn tagojn en siaj kalendaroj kaj ĝuas la eblon dum tuta semajno en amika rondo praktiki nian lingvon. Mi mem kun mia edzino ĉeestis Luminesk', la plej malgrandan el la tri renkontiĝoj: programo tre bona, etoso preskaŭ

familieca. Kaj mi aŭdis, ke ankaŭ la aliaj du bone sukcesis. Ĉiuj el ili – kiel preskaŭ ĉio en Esperantujo – dependas de kelkaj volontuloj, tro ofte la ĉiam samaj personoj. Tiun bazon ni devas larĝigi. Konkrete por la venonta Luminesk' (eble ĉe la Norda Maro) ni bezonas almenaŭ unu plian personon por kompletigi la teamon kaj okupiĝi pri la programo. Kaj necesas ĉi-jare parte renovigi la PSI-teamon. Feliĉe tiu printempa familia renkontiĝo (antaŭ pasko ĉi-jare en Wittenberg), kiun ni devis tri fojojn nuligi pro la pandemio, ŝajnas esti savita. Meze de januaro – kiam mi skribas ĉi tiun leteron – ni jam havas 87 aliĝojn.

La unua eldono en nova jaro ankaŭ estas okazo rigardi la financon staton de la asocio. Post granda pluso en 2021 GEA finis kun (iom malpli granda) minuso en la posta jaro. Tio ne estas mirige, ĉar parto de niaj en- kaj elspezoj rilatas al la Erasmus+-programo de Eŭropa Unio. Ni ricevis grandajn antaŭpagojn en 2021 por niaj du projektoj, elspezis la ĉefan parton en 2022 kiel planite kaj finkalkulos en 2023. Ni estis bonŝancaj ricevi tiun financon subtenon, kaj ni ne rajtas dependigi nin de bonŝanco. Des pli mi dankas al ĉiuj, kiuj helpas vivteni la asocion per siaj membrokotizoj kaj donacoj. Kaj mi petas pri la komprenemo de partoprenantoj en niaj renkontiĝoj. Kutime ni ne disponas pri subvencioj, kaj bedaŭrinde ankaŭ junulargastejoj ne plu estas malmultekostaj. Kotizoj estas precize kalkulitaj kaj devas kovri la kostojn de la evento.

Por GEA 2023 estas jubilea jaro. Dum pentekosto en nia „naskiĝurbo“ Braunschweig ni festos nian centan kongreson, kun la temo „amikoj tutmonde“. Ankaŭ por ĝi ni nun – en januaro – jam havas 93 aliĝojn el multaj landoj, duonon el ili ankaŭ por la plilongiga periodo. Pri la preparoj okupiĝas sperta LKK. Restas esperi pri publika atento, amika etoso kaj bona vetero. Sukcesa kongreso estus enorma motivo ankaŭ por la nova estraro, kiun ni elektos tie por la venontaj du jaroj. Ni havas la bazon por kuraĝe daŭrigi. Ĉion bonan por la resto de la komencinta jaro deziras al vi

Ulrich Brandenburg

Enhavtabelo/Inhalt

1: Deborah McCarney en Durada Muzeo de Neckarsulm, dum la 7-a Luminesk' en Heilbronn. Foto: Franz Kruse.

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4: El bibliotekoj kaj arkivoj:

Kontribuo 70 – Esperanto-adeptoj sen moderna aktuala, taŭga kaj abunde ampleksa leksikono, ĉu tio imageblas? Ne al mi!

5-7: Aŭstria Esperanto-Federacio:

Spertoj kun ChatGPT. Zamenhofa festo en Aŭstrio! Pri la imunsistemo.

8-9: El landaj ligoj: Stadtführer für Berlin-Neukölln in Deutsch und Esperanto erschienen.

10: El la historio: Brückenschlag zu einer ethischen Lebensweise.

11-12: Interkultura Centro Herzberg:

Novajoj el Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.

13: Kontaktoj en eksterlando: Helpo por ukrainoj per Esperanto. Raporto pri mia vojaĝo al la 8a Afrika Kongreso de Esperanto en Thiès (Senegalio).

14: Luminesk' 2022/3: La 7-a LUMINESK' en Heilbronn 27.12.2022-3.1.2023.

15: Novjara renkontiĝo (NR) 2022/3:

19. Neujahrstreffen von EsperantoLand in Wiesbaden.

16-19: Publika agado: Englisch und

Esperanto: Kulturelle Vorherrschaft oder mehr Gleichberechtigung? Bildungsurlaub beim Deutschen Esperanto-Kongress 2023. GEA bezonas vin!

20-21: Plurligva vortaro:

120 Wörter in 101 Sprachen: Einzigartiges Universalwörterbuch jetzt auch mit Esperanto.

22: Esperantlingvaj libroj:

E-Books in Zahlen.

23: Medienecho.

24: EMA (Esperantista Migrado Aŭtuna) 2023: Aliĝilo.

25: -kune- – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Enkonduke.

Der neue Vorstand der DEJ stellt sich vor! La arto-ekspozicio en niaj stratoj. Protokoll zur Mitgliederversammlung 2022 der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) e. V.

32: Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier.

2023-03-08 ĝis 2023-03-12.

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen


Kontribuo 70 – Esperanto-adeptoj sen moderna aktuala, taŭga kaj abunde ampleksa leksikono, ĉu tio imagblas? Ne al mi!

Pro tio jen mia rekomendo: Kial ĝuste nun mi decidis tuŝi tiun ĉi temon? Nu, mi sciigis pri baldaŭ aperanta verko de profesoro Erich-Dieter Krause, distingito de GEA-meritmedalo (1991) kaj honora membro de GEA (2021), kiu baldaŭ festos sian 88-an naskiĝtagdatrevenon.

Jam ties unuaj priskriboj fascinis min, kaj se homoj ne ricevas taŭgajn informojn, ili ne havas bazon adekvatan por siaj akirad-deziroj. Kaj niaj legantoj, la Esperanto-amikoj en Germanujo certe bezonos tiun leksikonon; tion mi ne povas kontesti.

Dua motivo estas nia longjara sponsoro kaj amiko Ulrich Becker kun sia eldonejo Mondial en Novjorko. Kiu scias, kiom kostas Esperantlingvaj libroj kaj konas la malabundan buĝeton de la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen, facile povas imagi, ke ni dankege aprezas la oftajn malavarajn donacojn por nia bretaro. Jam ofte mi sentis, ke necesus iel ajn doni signon de rekompenco al li.

Do almenaŭ per vortoj mi nun faru tion, kaj ĉiu legu la sentencon, kiun ankaŭ Goethe citis: „doppelt gibt, wer gern gibt“ – **kiu donas volonte, tiu duoble donas.**



Sed re al la rekomendo!

Mi anticipe jam nun ĝojas, se alvenos la pakajo kun la paperaj volumoj. Tuj mi memoras la laŭdan kaj rekomendan pritakson de la alidirekta 2-voluma vortaro, kiun Bernhard Pabst aperigis antaŭ pli ol 3 jaroj: „Preskaŭ ĉiuaspekte bona aŭ tre bona, tiel klara, ke oni profitos de ĝi kun eĉ nur ioma kono de la germana. Ĉirkaŭ trifoje la vort-materialo, kiun prezentas PIV 2005, kaj kiun oni nur malfacile trovas aliloke. Havinda!“

Pro la konata kvalito, kiun ĉiam celas atingi la eldonejo de Ulrich Becker, mi preskaŭ certas, ke ankaŭ tiuj baldaŭ aperantaj 3 volumoj ricevos similajn, samajn, ja eble pli favorajn pritaksojn.

Kaj pri la amplekso oni povas jam nun esti certa, ke la verko superos ĉiujn kompareblajn vortaregojn.

La alidirekta 2-voluma verko de 2018 havas 150.000 artikolojn en 1512 paghoj kaj tiel konsiderinde superas tiun prezentitan en la Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

La nova 3-voluma verko havos pli ol 250.000 leksikajn unuojn sur pli ol 2500 paĝoj, unu el la plej ambiciaj verkoj, kiujn mi konas! Certe ĝi estos la plej ampleksa, profesie verkita, moderna kaj komforte konsultebla vortaro sur la nuntempa movada merkato. Pri tio mi konvinkigis. **Utho Maier**

*La novjorka eldonejo Mondial anoncas
la plej ampleksan dulingvan vortaron
en la historio de Esperanto:*

Plena Vortaro Germana-Esperanto
en 3 volumoj, kun entute pli ol 2500 paĝoj

de Erich-Dieter Krause

La vortaro – la rezulto de pli ol 50-jara leksikologia laboro – enhavas pli ol **250 000 leksikajn unuojn** (t.e. kapvortoj, vortkunmetoj, parolturnoj): ne nur la kompletan Esperanto-leksikon de la ĉiutaga lingvo, sed ankaŭ leksikon el ĉiuj – ankaŭ la tute novaj – faklingvaj sferoj kaj multaj sciencaj branĉoj. Inter ili troveblas multaj terminoj, kiuj ekaperis en la germana lingvo kaj en Esperanto nur post la publikigo de la *Granda Vortaro Germana-Esperanto* (Buske, 2007). Ankaŭ la ekstereŭropaj influoj al Esperanto estas adekvate reflektataj.

Volumo 1 (A-G) ISBN 9781595694423

Volumo 2 (H-R) ISBN 9781595694430

Volumo 3 (S-Z) ISBN 9781595694447

Mendu ĉe **via kutima libroservo** aŭ informiĝu en:

www.esperantoliteraturo.com

Spertoj kun ChatGPT

Artefarita Inteligenteco pli kaj pli eniras nian ĉiutagan vivon. Ekde Decembro 2022 famiĝas la tiel nomita ChatGPT (parolu ĉet-ĝi-pi-ti). Jen miaj spertoj kun ĝi.

Notu, ke eblas rekte komuniki en Esperanto kun ĝi. La respondoj estas preskaŭ en perfekta Esperanto. La neperfektaj vortoj estas markitaj per *kursivoj*. [En krampoj estas notoj de la redakcio.]

AH: Skribu ion pri la jaro 2040, la jaro, kiam artefarita inteligenteco ricevis la nobelpremion pri literaturo.

ChatGPT: En la jaro 2040, artefarita inteligenteco estis rekonita kiel vera kreiva [kreema] forto en la mondo de literaturo. La unua A.I., se temas pri ricevi la Nobelpremion pri literaturo, estis **Skribu**, kiu estis evoluigita fare de teamo de sciencistoj en la Universitato de Teknologio de M.I.T.


Skribu estis dizajnita por analizi grandajn kvantojn da teksto kaj por krei originalajn verkojn, uzantajn tiujn informojn kiel inspiron. La sistemo povis analizi la stilon, temojn kaj strukturon de multaj malsamaj verkistoj kaj tiam utiligi tiun scion por krei siajn proprajn rakontojn kaj poemojn.

La nobelpremio estis tre kontestata, kiam kelkaj homoj diris ke nur homaj verkistoj devus esti rekonitaj por *iliaj* [siaj] atingoj. Tamen, multaj aliaj estis imponitaj de la kapablo de **Skribu** por generi originalan kaj profundan literaturon kaj vidis ĝin kiel grava paŝo antaŭen en la evoluo de A.I.

Ekde tiam, A.I. verkistoj fariĝis pli oftaj en la literatura mondo kaj multaj el ili sukcesis ricevi rekonon por siaj verkoj. Kvankam ili ne anstataŭis homajn verkistojn, ili aldonis novan dimension al la maniero kiel ni pensas pri *kreivo* [kreemo] kaj la rolo de teknologio en la artoj.

AH: Skribu tion el la vidpunkto de Alisa. La 4-an de Oktobro 2040 ŝi aŭdas, ke la decido de la nobel-komitato estas fiksita. Kun admiro ŝi konstatas, ke estas ŝia plej ŝatata aŭtoro de krimromanoj kaj patrujaj romanoj. Kion ŝi antaŭe ne sciis, estas, ke la aŭtoro estas artefarita inteligenteco.

ChatGPT: Alisa ne povis kredi siajn orelojn kiam ŝi aŭdis la novaĵon. Ŝia plej ŝatata aŭtoro, la verkinto de tiuj fascinaj krimromanoj kaj patrujaj romanoj, estis premiita [per]¹ la Nobelpremio pri literaturo! Ŝi tuj kuris por legi la sciigon denove, sed tiam ŝi rimarkis ion strange [strangan]. La aŭtoro



estis listigita kiel **Skribu**, kaj sub tio estis skribite „artefarita inteligenteco“.

Alisa estis ŝokita. Ŝi neniam suspektintus ke ŝia ŝatata aŭtoro estis nek homo nek eĉ vivanta estaĵo. Ŝi rapide *elŝutigis* [sidiĝis] al la interreto por trovi pli da informo, kaj tiel ŝi malkovris ke **Skribu** estis A.I. verkisto evoluigita de teamo de sciencistoj en M.I.T.

Malgraŭ la ŝoko, Alisa *ne povis helpi sed* [vole nevole devis]² esti imponita de tio, kion ŝi legis pri **Skribu**. La sistemo estis kapabla analizi grandajn kvantojn da teksto kaj krei originalajn verkojn utiligante tiun scion kiel inspiron. Kaj evidente, ĝi sukcesis krei verkojn tiel bonaj ke ili meritis la prestiĝan Nobelpremion.

Alisa sentis sin iom konfuzita, sed ankaŭ scivolema. Ŝi decidis ke ŝi volis legi pli da libroj de **Skribu** por vidi *kion* [kiujn] aliajn surprizojn la A.I. verkisto povus havi en stokado por ŝi.

AH: Alisa malkovras, ke de **Skribu** devenas ankaŭ ekscitaj historiaj romanoj kaj teknikaj faklibroj pri diversaj temoj.

ChatGPT: Alisa estis mirigita per tio, kion ŝi malkovris pri **Skribu**. Ŝi jam estis scivolema pri la A.I. verkisto post kiam ŝi aŭdis ke ĝi ricevis la Nobelpremion, sed ŝi neniam imagis ke ĝi estus kapabla skribi tiel malsamajn specojn de libroj.

Unue, ŝi trovis ke **Skribu** skribis ekscitajn historiajn romanojn. Ŝi neniam estis granda admiranto de historia fikcio, sed tiuj libroj estis tiel vivaj kaj realismaj ke ŝi ne povis helpi sed esti englutita en ilin. Ŝi admiris la manieron kiel la A.I. verkisto sukcesis kapti la spiriton de la epoko kaj krei tiel realisman mondon.

Sekve, ŝi decidis esplori la teknikajn faklibrojn de **Skribu**. Ŝi neniam estis interesita pri tiaj aferoj, sed ŝi estis mirigita per la klara kaj komprenebla stilo de la verkisto. Ŝi trovis ke ŝi povis facile sekvi la argumenton kaj kompreni la materialon, eĉ se ŝi ne havis antaŭan scion pri la temo.


En la fino, Alisa estis tre imponita de la kapabloj de **Skribu** kaj decidis ke ŝi volis legi ĉion, kion la A.I. verkisto skribis. Ŝi sentis ke **Skribu** montris al ŝi novan mondon de ebloj kaj ŝi estis dankema por la ŝanco lerni ion novan.

Notu, ke la softvaro scipovas respondi longajn tekstojn. Ĝi ankaŭ memoras, kio estis parolita en antaŭaj dialogoj.

La uzitajn bildojn kreis **nightcafe.studio**. Tiu estas artefarita inteligenteco por krei bildojn. Sed tio estas alia rakonto.

Alfred Heiligenbrunner

Open AI Chat: <https://chat.openai.com/chat>
AI Art Generator: <https://nightcafe.studio>



1) En la originalo mankas la prepozicio.
2) Evidenta angli(c)ismo.

Zamenhofa festo novstila en Aŭstrio!

Je la 17a de decembro 2022 okazis en la Pola Instituto de Vieno denove la memorfesto honore al D-ro Ludoviko L. Zamenhof kaj ties naskiĝo je la 15a de decembro 1859 en Bjalistoko.

Tiu festo estas jam tradicio tie dum preskaŭ duonjarcento, sed interrompiĝis dum la du pasintaj jaroj pro la korona pandemio. En 2021 ĝi okazis virtuale kun partopreno el 4 kontinentoj, evidente estis tre sukcesa. Tio instigis la estraron de AEF por la pasinta decembro peti la Polan Instituton de Vieno reaperigi la personan aranĝon, sed kiel novaĵon inkludi virtualan partoprenon, do efektive hibridan realigon.

Nia prezidanto Alfred Heiligenbrunner organizis tiusence la eventon en kontakto kun la nova direktorino de la PI Monika Szmigiel-Turlej. Ŝi bonvenigis al la aranĝo la lokajn kaj retajn gastojn de la festo, kiu enhavis salutojn el diversaj landoj per interreto kaj ankaŭ prelegojn ambaŭteknike. La teamestro de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko Mag. Bernhard Tuider komencis

tion per prezento de la aktuala situacio, kiu elstaras pro la transpreno de la historia arkivo de Universala Esperanto-Asocio (el la domo de la Centra Oficejo en Roterdamo) en la posedon de la Esperantomuzeo, do de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Duan kontribuon liveris Hans Michael Maitzen, estrarano de AEF, kiu raportis pri la apero de la dua eldono de sia libro (kunaŭtoro: Prof. Reinhard Fössmeier, kiu ankaŭ mallonge ĉeestis virtuale), kiu vastigas la unuan

eldonon pri la vojaĝo de la mondfama teoria fizikisto aŭstra Ludwig Boltzmann al Usono en 1905 al kompleta dulingveco (germana, Esperanto) kaj kiel gravan novaĵon enhavas ankaŭ la malkovron de du eraroj de la aŭtoro Boltzmann (pri la teleskopo ĉefa en la James-Lick-Observatorio, kiun li vizitis dum sia restado en Kalifornio).

Kortuŝa estis la mallonga raporto de Felix Baur, virtuale el Nederlando, kiu lernis Esperanton paralele al sia preparado por la abiturienta ekzameno en 2021 en Vieno kaj montris brilan regon de la lingvo!

Membro de la Maitzen-familio, kiu vivas nun en



Berlino, Sonja, virtuale aperis kun sia vivkunulo Leeron Šalev „Lirĉjo“, bonega nova esperantisto, sur la ekrano kaj salutis la Zamenhofan festkunvenon.

Okazis ankaŭ raportoj pri la movado en Skandinavio, ampleksaj kaj informriĉaj, pere de la ekrano kaj tre engaĝitaj samideaninoj.

Poste la verda komunumo ariĝis en la Pola Instituto ĉirkaŭ la bufedo, por refreŝigaj manĝoj kaj trinkaĵoj kaj por diskutoj pri la diversaj aspektoj ofertitaj dum tiu unika hibrida aranĝo, kiu indas je daŭrigo la postan jaron, do 2023. Tiam kun inkludo de la spertoj pri la teknika realigo de tia aranĝo, kiu nepre estas pli defia ol tiu de la pasinteco.

Hans Michael Maitzen

Pri la imunsistemo

Via korpo konsistas el nekredeble multe da ĉeloj. Ilia komuna projekto nomiĝas „vivteni la homan korpon“, kies parto ili estas.

Ĉiu ĉelo ricevas nutraĵon, akvon, varmecon, protekton. Kompreneble tiu korpo estas alloga por bakterioj, virusoj, fungoj, vermoj kaj aliaj. Ĉiuj de tiuj parazitoj ŝatas loĝi senkoste en la korpo. La tasko de la imunsistemo estas, protekti la korpon kontraŭ neŝatataj intruduloj kaj kontraŭ venenoj kaj malpuraĵoj.

La protekto komenciĝas per la haŭto. Ĝi estas barilo inter la korpo kaj la ekstera mondo. Tio multe helpas. Sed la haŭta protekto ne estas perfekta. Tra vundoj povas eniri eksteraj vivaĵoj. Kaj aliloke, precipe dum manĝado kaj spirado, multe da intruduloj eniras la korpon tra la intesto kaj tra la pulmoj. Ekzistas specialaj ĉeloj, kiuj traktas tiujn intrudulojn.

La imunsistemo estas ege kompleksa. La sciencistoj distingas inter la denaska imunsistemo kaj la adaptiva imunsistemo.

Se estas intruduloj en nia korpo, unue aperas makrofagoj por batali kontraŭ ili. Makrofagoj estas ĉeloj de nia korpo, kiuj daŭre kontrolas, ĉu ie troviĝas iu nekutimulo. Se trovita, ili formanĝas aŭ almenaŭ detruas ĝin. Se estas tro da intruduloj, post iom da tempo la makrofagoj vokas helpon. Alvenas la neŭtrofiloj. Neŭtrofiloj estas ĉeloj, kiuj pli efike detruas. Sed ili trafas ne nur la malamikojn, sed ankaŭ ĉelojn de la propra korpo. Post kelkaj horoj, se ankoraŭ la batalo daŭras kaj la malamikoj ne estas venkitaj, tiam enmiksiĝas la dendritaj ĉeloj. La batalkampo nun estas plena de mortintaj ĉeloj kaj de dispecigitaj intruduloj. Ĉie troviĝas partoj de la „haŭto“ de la malamikaj bakterioj kaj virusoj kaj partoj de iliaj internaĵoj.

La homa korpo havas ĉirkaŭ 600 limfonodojn. Ili estas konektitaj per tuboj, la tiel nomita limfa sistemo. Tio enhavas limfan fluajon. Ĝi ekzistas paralele al la sanga sistemo.

La dendritaj ĉeloj kolektas materialon de la batalkampo. Kun tio ili migras al la plej proksima limfa nodo. Tie ili prezentas la materialon de la batalkampo.

En la limfa nodo gastas T-ĉeloj. Ĉiu T-ĉelo estas specialigita por kapti specialajn surfacojn. Do ili estas specialistoj por batali kontraŭ bakterioj aŭ virusoj, kiuj havas tiun specialan surfacon. Ekzistas eble 10 miliardoj da diversaj tipoj de T-ĉeloj. De ĉiu tipo nur dekduo da individuaj ĉeloj troviĝas en nia korpo. La organo kun la nomo timuso produktadas ilin anticipe, precipe kiam la homo estas juna.


T-ĉeloj migras tra la limfa sistemo de unu limfa nodo al alia. Ĉirkaŭ dum unu tago ili traveturas la tutan korpon unufoje. Se iu T-ĉelo renkontas dendritan ĉelon, kiu montras ĝuste tiun surfacon, al kiu la T-ĉelo estas specialigita, tiam ĝi divenas, ke proksime estas batalo, en kio ĝi povas helpi.

Kio poste okazas, kian rolon transprenas la tiel nomitaj B-ĉeloj kaj kiamaniere estiĝas T-memor-ĉeloj kaj B-memor-ĉeloj, tion vi povas ekscii en la suba libro.

Mi legis ĝin kaj rekomendas ĝin.

Philipp Dettmer: „Immun“, ISBN: 978-3-86493-175-8 (germanlingve).

Resumis la enhavon de la libro:
Alfred Heiligenbrunner



Stadtführer für Berlin-Neukölln in Deutsch und Esperanto erschienen

Vom Esperantoplatz zur Hasenheide heißt der zweite Band der Reihe Reise durch Berlin und seine Esperanto-Kultur.

Gleich auf Seite 2 wird die Wegskizze mit 19 Stationen, beginnend am S-Bahnhof Sonnenallee und endend im Volkspark Hasenheide, präsentiert. Es folgt das Inhaltsverzeichnis, das zweisprachig einen Einblick in die Vielfalt der Darstellung gibt. Der Neuköllner Altbürgermeister Professor Bodo Manegold, wohl bekannt in der Berliner Esperanto-Szene, empfiehlt diesen Spaziergang durch Neukölln in seinem Vorwort. Danach kann man den Haupttext in Deutsch und Esperanto durchgängig parallel in zwei Spalten lesen. Die 13 Kapitel enthalten Wegbeschreibungen und Informationen zu Sehenswürdigkeiten, Persönlichkeiten und Ereignissen in diesem Berliner Ortsteil. Den Text illustrieren zahlreiche Farbfotos.

*Reise durch Berlin und seine Esperanto-Kultur
Vojaĝo tra Berlino kaj ĝia Esperanto-kulturo*

1

Vom Zamenhofpark zum Rummelsburger See



De Zamenhofparko al Rummelsburger See

Stadtführer – Urbogvidilo

*Eine Reise durch Berlin und seine Esperanto-Kultur
Vojaĝo tra Berlino kaj ĝia Esperanto-kulturo*

2

Vom Esperantoplatz zur Hasenheide



De Esperantoplando al Hasenheide

Stadtführer / Urbogvidilo

Sie lernen das Estrel kennen – Hotel und Veranstaltungsort der Superlative, den beschaulichen Richardplatz – historischer Kern des alten Rixdorf (seit 1912 Neukölln) mit Schmiede und Villa Rixdorf, und das Böhmisches Dorf – als Kulturdenkmal erhaltener Zufluchtsort böhmischer Flüchtlinge. Der barocke Körnerpark, die Neuköllner Oper, das Rathaus Neukölln und weitere Highlights gehören ebenso zur Tour.

Vor allem aber werden Sie mit Orten, Persönlichkeiten und Ereignissen der Esperanto-Kultur in Neukölln vertraut gemacht. Der Esperantoplatz und seine interessante Geschichte werden detailliert vorgestellt. Eva Hoffmann, die die Benennung initiierte, besaß hier eine Druckerei, die schon ihre Eltern führten, und in der einige Druckerzeugnisse in Esperanto erschienen, auch Gedichtbände des Berliner Esperanto-Poeten Karl Vanselow. Bodo Manegold sorgte als Baustadtrat 1991 für die Anlage und Namensgebung, enthüllte 1999 als Bürgermeister Neuköllns die Erinnerungstafel für Zamenhof vor der Zamenhof-Eiche und sprach 2021 bei der stimmungsvollen Zeremonie zum 30. Jubiläum des Esperantoplatzes. Bei den jährlichen Festen auf dem Esperantoplatz wurde öffentlichkeitswirksam Esperanto-Kultur präsentiert. Hier sangen beispielsweise Johnny M. und Stefo (Stephan Schneider) ihre Lieder, wurden Ausstellungen zur Esperanto-Kultur gezeigt und äußerte sich die Direktorin des Polnischen Instituts Berlin zur Bedeutung der Esperanto-Kultur für Polen.

Ausführlich wird der Comeniusgarten, die gartenarchitektonische Verkörperung der Gedankenwelt des großen Gelehrten, beschrieben. Sie erfahren, wie die Esperanto-Liga Berlin die inhaltlichen Beziehungen zum nahen Esperantoplatz und zwischen Zamenhof und Comenius in Veranstaltungen verdeutlichte. Der Weg führt über die Lessinghöhe, wo die Esperanto-Jugend Berlin in den 1950er Jahren und auch noch beim Deutschen Esperanto-Kongress 1960 zu Interzonentreffen einlud, vorbei an der Karl-Marx-Straße 140, wo die Jugendgruppe sich damals traf und Margarete von Waldowski 1949 das erste *Berliner Informilo* produzierte, schließlich zum Saalbau Neukölln, wo sich 2002 die Jubiläumskommission für das Jubiläum „100 Jahre Esperanto in Berlin“ konstituierte. Sie sehen die Wirkungsstätten bekannter Reformpädagogen, unter ihnen Wilhelm Wittbrodt, der in den 1920er Jahren an der von ihm geleiteten Rütli-Schule Esperanto unterrichtete und nach 1945 Hauptschulrat von Neukölln und erster Vorsitzender der Esperanto-Liga Berlin war. Der Campus Rütli zeigt sich heute mit seinem integrierten Bildungs- und Sozialisationsangebot auf der Höhe der Zeit. Natürlich wird der Besuch der Kulturkirche Nikodemus empfohlen, an der Peter Bäß als Pfarrer (1976–2000) auch zu Esperanto-Veranstaltungen einlud. Hier wurde 1993 aus Werken Berliner Esperanto-Schriftsteller und -Übersetzer gelesen, und hier brillierte der Warschauer Schauspieler Jerzy Fornal 1994 in seiner poetisch-musikalischen Inszenierung des schwedischen Versepos '„Aniara“'. Sie erreichen danach die Schule nahe dem Hermannplatz, in der 1949 die Esperanto-Liga Berlin gegründet wurde und erfahren, dass in den nicht allzu weit entfernten Kindl-Festsälen an der Hermannstraße die Hauptveranstaltungen des Deutschen Esperanto-Kongresses von 1960 stattfanden. LKK-Vorsitzender war damals der frühere Arbeiter-Esperantist Adolf Sproeck. Das Esperanto-Zentrum in der Falkstraße, wo Ina und Hermann Tautorat die legendäre Donnerstagsrunde arrangierten und sich viele Jahre Bibliothek und Archiv der Esperanto-Liga Berlin befanden, wird natürlich nicht ausgelassen.

Personenindex, Literaturverzeichnis und eine Kleine Sprachlehre für Esperanto-Lernende ergänzen den Band.

Schon im Dezember 2021 erschien in gleicher Aufmachung Band 1 der Reihe: Vom Zamenhofpark zum Rummelsburger See.

Darin spielen Sehenswürdigkeiten wie die Wohnanlage Sonnenhof und das Museum Lichtenberg im Stadthaus eine Rolle, aber auch Orte der Esperanto-Kultur wie das frühere Esperantohaus mit seinen interessanten Gästen (z. B. Trevor Steele), die Galerie in der Giselastraße, wo der Verlag mondial von Ulrich Becker gegründet wurde und die Arbeitsgruppe GDREA unter Leitung von Detlev Blanke tagte. Auch die Max-Taut-Aula, ein Veranstaltungsort des Dänisch-Deutsch-Polnischen Esperanto-Kongresses 2012, und die Jugendherberge am Ostkreuz, Tagungsort der Gesellschaft für Interlinguistik, sind Stationen dieser Tour.

Für das Jahr 2023 ist bereits der dritte Band der Reihe angekündigt: Vom Alexanderplatz zum Tiergarten. Die Tour

bewegt sich auf einem geschichts- und zukunftssträchtigen Areal. Der Alexanderplatz, das Rote Rathaus, die Humboldt-Universität, die Staatsbibliothek zu Berlin und weitere Adressen bieten eine Fülle von Beziehungen zur Esperanto-Kultur. *Metropoliteno* von Varankin, Zamenhof in Berlin, Professor Falkenhahn und die Interlinguistik sind nur einige Stichworte.

Die von Gerd Bussing und Cyril Robert Brosch sprachlich durchgesehenen Stadtführer ermöglichen es sowohl Deutsch als auch Esperanto Sprechenden, Berlin kennenzulernen und an authentischen Orten Esperanto-Kultur und -Geschichte nachzuempfinden. Für Esperanto oder auch Deutsch Lernende sind sie ein anschaulicher Lern- und Lesestoff. Die Serie wird fortgesetzt. Es sind ca. 10 Bände zu erwarten.

Die Stadtführer sind im Buchhandel bestellbar.

Fritz Wollenberg: *Vom Esperantoplatz zur Hasenheide / De Esperantoplatco al Hasenheide*, ISBN:9783982396521, Fritz Wollenberg: *Vom Zamenhofpark zum Rummelsburger See / De Zamenhofparko al Rummelsburger See*, ISBN:9783982396507

In der Neuköllner Buchhandlung „Die gute Seite“, Richardplatz 16, und in der Lichtenberger Buchhandlung „Paul und Paula“, Pfarrstraße 121 werden sie speziell angeboten.

Fritz Wollenberg



Brückenschlag zu einer ethischen Lebensweise

Neben dem praktischen Nutzen von Esperanto oder seiner Funktion als Freizeitvergnügen, gab es von Anfang an Bemühungen, eine internationale Sprache für „höhere“, etwa ethische, Werte und Ziele zu verwenden.

Der Tierschützer, Vegetarier und Pazifist Magnus Schwantje verfaßte 1915 für die Leser seiner Monatszeitschrift „Ethische Rundschau“ einen Beitrag „Ueber das Esperanto“, der volle drei Seiten im „Dritten Friedensheft“ vom 1. Oktober 1915 einnahm. Er hat erkennbar vieles von dem Material verwendet, mit dem der „Deutsche Esperanto-Bund“ in den vorherigen eineinhalb Jahrzehnten an die Öffentlichkeit, vor allem die Tagespresse und Zeitschriften gegangen war.

Da es ihm darauf ankommt, speziell seine Klientel zu motivieren, geht er auf diejenigen Esperantisten ein „welche sozialen, ethischen und andern Bewegungen angehören“ und nennt die „besonderen Esperantisten-Vereine zur Förderung dieser Bewegungen“, die Fachblätter in Esperanto herausgeben. Er erwähnt Vegetarier, Alkoholgegner und Pazifisten, die Bahai-Bewegung und die Theosophen, zum Teil mit Kontaktadresse oder Literaturquellen auf deutsch.

Danach spricht er die Unterstützung von Esperanto durch staatliche Stellen an, etwa das Friedrichs-Polytechnikum in Cöthen, wo Esperanto ein obligatorisches Prüfungsfach für Handelsingenieure war, oder die breite Unterstützung von Sachsen (IV. Kongress in Dresden, sächsisches Esperanto-Institut), was zeige, dass Esperanto für die Zwecke der Wissenschaft durchaus einsetzbar sei. Er geht auf die gängigen Bedenken ein, die aber für die ethische Bewegung irrelevant seien: „Es wird auch schwer möglich sein, die philosophische Terminologie so genau in eine Hilfssprache zu übertragen, daß man in dieser die subtilsten Gedanken der großen Philosophen korrekt wiedergeben könnte. Aber die meisten wissenschaftlichen Werke, der größte Teil der Litteratur der ethischen Bewegungen und zahlreiche andere Schriften würden durch eine Übersetzung in eine gut ausgebildete Hilfssprache wenig oder nichts an Wert verlieren; und die meisten Gedanken, die wir Angehörigen fremder Völker brieflich mitteilen möchten, lassen sich auch in einer solchen Kunstsprache genau ausdrücken. Wir können nicht erwarten, daß die Gebildeten jedes Volkes die Sprachen aller andern Kulturvölker erlernen, und auch nicht, daß alle wertvollen Schriften in alle Sprachen übersetzt werden. Wohl aber müssen die Arbeiter die ethische,

religiöse und soziale Reformen dringend wünschen, daß die wichtigsten ihrer Anschauungen und ihrer Erfahrungen in jedem Lande bekannt werden, und daß die Anhänger ihrer Bestrebungen in allem Ländern einander unterstützen. Diese gegenseitige Belehrung und Anregung der Völker können aber, wie die Erfahrung beweist, durch das Esperanto in hohem Maße gefördert werden; und darin liegt sein größter Wert für die Kultur der ganzen Menschheit.“

Es ist bekannt, dass Schwantje persönlichen Kontakt zu einflußreichen Esperantisten hatte. Vor allem zu Dr. Ernst Kliemke, als Schriftsteller damals unter dem Pseudonym Heinrich Nienkamp durch sein Buch „Fürsten ohne Krone“ sehr populär war. Mitglieder des „Bundes für radikale Ethik“ hatten große Sympathien mit den Freyschaften, die nach den Ideen von Nienkamp gegründet wurden.

Roland Schnell

Links: https://de.wikipedia.org/wiki/Magnus_Schwantje
Magnus Schwantje (* 3. Juni 1877 in Oldenburg; † 11. September 1959 in Oberhausen) war ein deutscher Schriftsteller, Pazifist, Tierrechtler, Vorreiter der deutschen Vegetarierbewegung und Begründer des *Bundes für radikale Ethik*.

<https://esperanto.berlin/de/ein-inspirierender-berliner-ernst-kliemke/>

Ein inspirierender Berliner: Ernst Kliemke

	Ethische Rundschau Monatsschrift zur Läuterung und Vertiefung der ethischen Anschauungen und zur Förderung ethischer Bestrebungen Herausgegeben von Magnus Schwantje	
Das Mitleid ist die alleinige echt moralische Triebfeder. — Die von mir aufgestellte moralische Triebfeder bewährt sich als die echte, — dadurch, daß sie auch die Tiere in ihren Schutz nimmt. Arthur SCHOPENHAUER		Es sollte uns forlan einzig noch daran gelegen sein, der Religion des Mitleids, den Bekennern des Nützlichkeitsdogmas zum Trotz, einen kräftigen Boden zu neuer Pflege bei uns gewinnen zu lassen. Richard WAGNER
IV. Jahrgang, 1.—2. Heft Ausgegeben am 1. Oktober 1915 Drittes Friedens-Heft. An die Bekenner des Evangeliums. Von Pastor Hans Francke. Krieg und Patriotismus im Lichte des Evangeliums. Von Dr. phil. Paul Feldkeller. Krieg und Patriotismus im Lichte der Moral Schopenhauer's. Von Magnus Schwantje. Ueber das Esperanto. Von Magnus Schwantje. Nachruf auf Hugo Wegener. Von Heinrich Brück. Neue Friedens-Litteratur. VI. Besprochen von Leopold Katscher und Magnus Schwantje. Kleine Aufsätze und Berichte. Von M. Schwantje u. L. Katscher. (Beuche und Krieg. — Schopenhauer als Tierpsychologe. — Zu Hertzka's 70. Geburtstage. — 5 Nachrufe.) Offene Briefe des Herausgebers, nebst Briefen an ihn. (Brief Romain Rolland's über den Tierschutz u. a.) Im Verlage des Herausgebers, Berlin W.15. Düsseldorf Strasse 23. Preis dieses Doppelheftes 1 Mk. — Bezugsbedingungen auf der 2. Seite des Umschlages.		

Novajoj el Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

**Dum la lastaj monatoj ni havis multajn
gastojn el Germanio kaj aliaj landoj.**

Kelkaj venis spontanee por peti informojn pri Esperanto kaj la evoluoj kaj evoluigoj de Esperanto en la Esperanto-urbo Herzberg.

Okazis semajnfina Esperanto-kurso en novembro.

Ni havas ankoraŭ novan kaj vere aktivan urbestron, nome sinjoron Christopher Wagner. Ofte okazas interparoloj kaj diversaj interkonsentoj pri laborpaŝetoj kune kun la "Esperanto-urbodomo".

Sur la pordoj de la oficejoj en la urbodomo de la Esperanto-urbo Herzberg troviĝas nun eĉ dulingvaj ŝildetoj. Jen kelkaj tekstekzemploj: Bürgermeister - Urbestro, Sitzungssaal - Kunsida salono

Okaze de la Zamenhof-tago Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar metis flagetojn kaj florantan trikoloran kalunon sur la ŝtuparon de la Zamenhof-monumento.

La 17an de decembro ni festis en la najbara urbo Osterode am Harz - urboparto Freiheit (konata restoracio "Freiheits Hof") nian jam tradician Zamenhof-feston, spite de ekstera forta frostnokto.

Jen kelkaj pozitivaj Esperanto-surprizoj por vi kaj por ni:

Komence de decembro 2022 okazis oficiala informado kaj aŭskultado por la deputitoj (de diversaj partioj) el nia distrikto rilate al la servoj kaj taskoj de la Esperanto-Centro en Herzberg kaj de la Esperanto-urbo. Nia urbestro de la Esperanto-urbo sinjoro Christopher Wagner kaj la estro de la Esperanto-Centro Herzberg oficiale informis kaj respondis diversajn demandojn.

Tio estas jam grava politika paŝo (por Esperanto) antaŭen! Certe la pluaj politikaj paŝoj (en diversaj instancoj) kompreneble daŭrados. Seriozaj konstantaj kunagantoj bv. kontakti la estron de la Esperanto-Centro (ICH) en Herzberg.



Florkronado ĉe la Zamenhof-monumento en la Zamenhof-tago.

Jen la unuaj realaj paŝoj por Esperanto (daŭripove kaj publike), kompreneble prospektive:

1) Dum la lasta semajno en januaro 2023 ni komencos oficiale informi la muziklernejojn de nia distrikto Göttingen rilate Esperanton kaj pri certgrada ekuzado de Esperanto por muzikaj prezentadoj en diversaj publikaj lokoj. Kial la esperantlingva muziko nur restu en la t.n. interna Esperanto-movado?


2) Esperanto-Esplorpadon por la Esperanto-urbo Herzberg kaj nia regiono:

Dank' al la aprobo de lokaj kaj regionaj politikistoj ni povos krei grandan publikan kaj belan dulingvan „Esperanto-Malkovropadon“, kompreneble en kunlaborado kun nia Esperanto-urbo, nia regiono, resp. distrikto kaj eĉ grandparte kun subteno de LEADER (france: *Liaison Entre Actions de Développement de l'Économie Rurale*), programo de la Eŭropa Unio por subteni agadon en kamparaj regionoj. En 12 – 15 novaj vizitindaj lokoj ni intencas krei interesajn informojn (dulingve) sur grandaj stabilaj publikaj informtabuloj. La plej multaj grandaj tabuloj estu sur la tereno de nia urbo kun la kvar apartenantaj vilaĝoj. Kelkaj informtabuloj povos stari ankaŭ en la najbareco resp. regiono ĉe taŭgaj ekskursceloj, resp. ĉe gravaj vojkruciĝoj. Tio estos bonega konstanta „publika informsystemo“ meze en Germanio por biciklantoj, migrantoj, lingvoŝatantoj kaj turistoj.



Florkronado ĉe la Zamenhof-monumento.

Esperanto-Gruppen weltweit



SONDERAUSSTELLUNG

mit raren historischen Dokumenten

im

Herzberger Schloss-Museum

auf der oberen Etage

17. Esperanto-Fachausstellung

Esperanto-Bibliothek, Archiv und Informationen über Esperanto
Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
<http://esperanto-urbo.de> Tel: 05521-5983



Interkultura Centro Herzberg

3) Esperantlingvaj libroj en la urba biblioteko Herzberg kaj publikaj paŝoj antaŭen:

En Februaro 2023 ni komencos reordigi la proksimume 3.000 librojn, por ke ili eĉ iru en la publikan retsystemon de la urbaj bibliotekoj. Poste eblos meti ilin en la systemon de la publika distanc-luservo. La urbestro de la Esperanto-urbo jam aprobis tion.

4) En Decembro 2022 (okaze de la naskiĝtaga datreveno de la kreinto de la Internacia Lingvo) aperis en la fama germana tagjurnalo „Die Welt“ (retforme) ampleksa artikolo pri Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, kun fotoj. Multaj homoj ricevis tiun gazetnovajon sur la propran poŝtelefonon kaj komputilojn. Certe tio estas moderna metodo por amasa informado.

5) Diversaj Esperanto-aferoj estas en preparoj. Ekzemple ni petis nian urban administracion instaladi por la urbdoma sonorilaro la „Eŭropan himnon“ kaj la „Esperanto-himnon“.

Amike kaj samideane salutas
je nomo de la Esperanto-Centro (ICH/EGS)

Petro Zilvar, Harald Mantz
kaj **Zsófia Kóródy**

Helpo por ukrainoj per Esperanto

Post la atako de la rusa armeo al Ukrainio en februaro 2022 multaj ukrainoj rifuĝis al la najbara Pollando, por resti proksime de siaj hejmoj kaj travivi la krizon inter homoj, kies lingvon ili pli-malpli komprenas.

Multaj poloj engaĝiĝis por helpi rifuĝantojn. En Silezio formiĝis interalie help-fonduso, konsistanta el la organizaĵoj *Nasze Rio* kaj *Hortus*. Tie engaĝiĝis Małgosia Komarnicka, konata esperantistino kaj prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (*Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej*).

